Raporto de la Ĝenerala Asembleo 2020

Compte-rendu de l'assemblée générale 2020

Esperanto-Kultur-Centro Tuluzo (EKC)

Centre Culturel Espéranto de Toulouse

Mardi 15/12/2020 - 20h
(Par Zoom)

Faciliganto: Michael Boris (*Marion Quenut*)
Facilitateur/ice

Protokolanto: Leïla M (*Leïla H*)
Secrétaire

Bleu *= tâche à faire*

20:00 *(20 min)*	**Enkonduko** *Introduction*

1. Ĉeestantoj kaj neĉeestantoj, povoj, kontrolo pri la aliĝintecoj
   Présent.es/excusé.es/pouvoirs + Vérification de l'adhésion des membres

   Ĉeestis MB, Françoise, Flo, Marc, Quentin, Marion, Leïla H, Leïla M, Jonathan, Tanneguy, Christophe, Robert, Nicolas = ĉiuj membroj
   Marido senkulpigis sin kaj donis sian povon al Flo
   Do : 13 ĉeestantoj, 14 voĉoj.
   Marko kaj Robert devis foriri antaŭ la fino de la kunsido, ankaŭ Françoise pro komputil-problemoj.

   Présent.e.s : Michael Boris (MB), Françoise, Flo, Marc, Quentin, Marion, Leïla H, Leïla M, Jonathan, Tanneguy, Christophe, Robert, Nicolas = tous et toutes membres
   Marido, excusée, a donné son pouvoir de vote à Flo.
   Donc 13 présents et 14 votes. Marc et Robert ont dû partir en cours de réunion. Françoise aussi involontairement à cause de problèmes d'ordi.

2. Prezento de la tagordo kaj de la organizo - aldono de tagorderoj - Aprobo
   Présentation de l'ordre du jour et de l'organisation de l'AG, rajout de points, vote

   Ĉiuj aprobas la tagordon, neniu aldono.
   Approuvé à l'unanimité sans ajout

20:10 *(10 min)*	**Agad-raporto** (Marion) *Rapport d'activité*

1. Precizigoj pri la agad-raporto
   Précisions sur le rapport d'activité

   • Neniu aparta demando.

Marion mencias kelkajn novaĵojn : rehavo de la ĉambro Rangueil, klubo en Jean Jaurès, ludvesperoj “Koboludo”, retaj eventoj pro pandemio, bicikladoj, mallonga kurso rete, civita servo eksterlande… La raporto estis sendita al ĉiuj retmesaĝe antaŭ 15 tagoj.
MB komentas ke malmulte da lokaj asocioj havas tiom multe da aktivadoj. Gratulon al Marion !
Marion dankas la membrojn de la asocio pro ilia kontribuo kaj aparte la programon Civita Servo kiu ebligas iujn multe labori en projektoj de nia asocio. Estas teamlaboro!
Pas de question en particulier.
Marion mentionne quelques nouveautés : ré-accès à la salle de la maison de quartier de Rangueil, club à l’université Jean Jaurès, soirées jeux Koboludo, événements en ligne pendant la pandémie, balades en vélo, cours express en ligne, service civique à l’international...
Le rapport a été envoyé aux membres il y a 15 jours.
MB commente que peu de clubs locaux d’espéranto dans le monde mènent autant d’activités. Bravo à Marion !
Marion salue les membres de l’association pour leur contribution et l’opportunité du programme Service civique qui permet à certain.e.s de consacrer beaucoup de temps aux projets de l’association, c’est un travail d’équipe !

2. Aprobo
Vote

Unuanime aprobita !
Tout le monde approuve

20:20 *(10 min)*	**Financ-raporto** (Marion) *Rapport financier*

1. Precizigoj pri la financ-raporto *(meti la ligilon)*
Précisions sur le rapport financier

• Komentoj : La subvencio de Erasmus+ ne estis tute uzita, ni devos redoni parton de ĝi (pli malpli 10000€).
Alia komentita linio, aliĝoj, donacoj : pli da enspezoj ol kutime, nerekte danke al la projekto Erasmus+, ĉar parto de tiuj donacoj estis farita de partoprenantoj al la projekto Erasmus+ kiuj ne elspezis la tutan sumon ricevitan por siaj moviĝoj. Tio helpos EKC por financi novajn kandidatiĝojn.
Demando : Kial en la linio “enspezoj” de Erasmus+ estas nenio ? ĉar la subvencio estis ĝirita pasintjare kaj do aperas en la antaŭa financa raporto.
Demando : ĉu la ŝtato subvencias la volontuladon per civita servo? Jes sed por la mentorado de volontuloj, pro tio aperas linio “bénévolat” en la raporto ĉar oni devas aperigi ke Marion faras tion volontule, sen salajro.

L’année dernière nous avons reçu un versement de subvention pour le projet clé 1 erasmus +, utilisé seulement en partie cette année, donc nous devrons rendre la partie non utilisée (environ 10000 €)

Autre ligne commentée, les adhésion/dons : + de dons et d'adhésions que d'habitude, grâce indirectement au projet Erasmus +, car une partie des ces dons a été fait par des participants au projet Erasmus + qui n'ont pas dépensé toute la somme allouée par forfait pour leur mobilité. Cela aidera l'association à redéposer à nouveau des demandes de subventions pour de nouveaux projets Erasmus
Question de Flo : Pourquoi il n'y a rien dans la ligne recettes d'Erasmus+ ? Parce que la subvention a été reçue l'année dernière et apparait dans le précédent rapport financier.
Question : l'Etat donne-t-il des subventions pour les volontariat en Service Civique. Oui, mais pour le tutorat des volontaires, c'est pour ça qu'apparaît une ligne "bénévolat" car Marion assure ce tutorat de façon bénévole (la subvention doit être justifiée par une valorisation comptable du bénévolat)

2. Aprobo
   Vote

   Unuanime aprobita !
   Tout le monde approuve

20:30 *(20 min)*	**Strategio kaj agad-plano de nia asocio** (faciliganto : Marion) *Stratégie et plan d'action de notre association*

1. Kie ni estas en la agad-plano? (MB)
   Où en sommes-nous du plan d'action ?

>>>legi la agadplanon adoptitan en 2019 - lire le plan d'actions adopté en 2019
>>>Legi la dokumenton por sekvi la realigadon de tiu plano. Lire le document de suivi du plan d'actions stratégiques

La laborgrupo pri agadplano kunsidas 2 aŭ 3 foje jare por taksi ĉu la celoj estas atingitaj kaj kiel fari por solvi malfacilaĵojn. Pandemio ne helpis por antaŭenigi la planon sed ni povas rimarki ke tamen kelkajn celojn ni atingis. Ekz. por niaj 3 prioritatoj :
Asocia fortiĝo : ni havas liston da iloj por organizi nin, liston de manlibroj kaj 8 el 10 jam estas skribitaj! Ili enhavas praktikajn informojn, estas ĉefe skribitaj de volontuloj pri iliaj taskoj kaj projektoj (ekz. Retejo, sociaj retoj, radioelsendo…). Ili povas helpi ĉiujn membrojn de la asocio. Planite estis baldaŭ fari unu pri Erasmus+ projektoj. Volontul-taksado estis farita fine de volontulado, la "notoj" estas altaj .
Tuluzo civitina (a)socio : la klubo en la universitato ekis sed haltis, danke al Ines kiu ankaŭ aktivas en la komisiono de TEJO pri universitata agado kaj ĵus eniris la estraron de JEFO. Ni kreis 2 specialajn radioelsendojn pri la Okcitana kaj lingvoj de Francio.

Al-ekstera kominikado : ni organizis dufoje debaton pri lingvaj politikoj en Eŭropo…sed devis nuligi ĝin dufoje pro la pandemio ! Trejnado por pli bone komuniki pri Esperanto kaj pri sociaj retoj estis liverita!

Tiu agadplano estos nia gvidilo por 2021. Por 2022, estus bone plani, ekde Septembro 2021, novajn laborsesiojn por konstrui novan planon por 2022-2024

• Le groupe de travail se réunit 2 à 3 fois par an pour suivre l'avancée de ce plan, voir si les objectifs SMART sont atteints et trouver des solutions en cas de difficultés. La pandémie n'a pas aidé à avancer, mais on peut remarquer que quelques buts ont déjà été atteints. Par exemple, pour nos trois priorités :

Renforcement associatif : la liste d'outils pour nous organiser a été faite, nous avons établi une liste fixe de manuels à établir, et 8/10 ont été écrits !
Ils contiennent des infos pratiques et sont écrits par les volontaires sur leurs tâches et des projets (ex : Site, réseaux sociaux, émission de radio), ils peuvent aider tous les membres de l'asso. Il est prévu d'en faire un bientôt sur les projets Erasmus +
Une "enquête de satisfaction" a été faite à la fin du volontariat, les notes sont élevées.

Association de la société civile toulousaine : le club à l'université Jean Jaurès a été lancé, sous l'impulsion d'Inès aussi très active dans le groupe Telegram de TEJO à propos de l'action universitaire et dans le bureau de JEFO. Deux émissions de radio spéciales sur l'occitan et les langues de France ont été réalisées.

Communication externe : nous avons organisé deux fois un débat sur les politiques linguistiques de l'Europe ! Mais malheureusement annulé deux fois à cause de la pandémie. Une formation pour mieux communiquer sur l'espéranto et sur les réseaux sociaux a été réalisée !

Ce plan stratégique restera notre guide pour 2021 et pour 2022, ce serait bien de prévoir, dès fin 2021, de nouvelles séances de travail pour bâtir un nouveau plan pour 2022-2024

2. Fokuso pri Volontulado Civita Servo - Novaj misioj (Marion)

• Volontariat en service civique, nouvelles missions

En 2020, ni devis peti novan akreditiĝon kaj laŭ la agadplano, plani akceptoplanon de 2 teamoj de 4 volontuloj. En la laborgrupo pri volontulado, ni decidis ke de venontjare estos nur misioj kadre de internacia civita servo, inter ili 7 misioj okazos parte en Francio kaj parte eksterlande. Malgraŭ la problemoj rilate al la pandemio la unua provo de tiaj misioj estis bona sperto, ĉar la misioj povas esti pli longaj, Quentin, Ines kaj Leïla restis 6 kaj 8 monatojn en tuluzo (preskaŭ kiel la civita servo nur en Francio) sed ankaŭ laboris ĉe TEJO en Roterdamo, E@I en Slovakio kaj BES en Pollando. Normale, en Tuluzo, la misioj povas daŭri maksimume 8 monatojn. Tio estas vera pluso por nia asocio, por la volontuloj kaj la partneroj. Kiam la volontuloj estas eksterlande ili komunikas kun ni, helpas novajn volontulojn, sendas materialon (artikolojn, intervjuojn), kaj ili helpas nin krei pli da ligoj kun niaj partneroj (ekzemple ni uzis por la kunsido la zoom-konton de BES), ili eksterlande spertiĝas, akiras pli bonan lingvonivelon kaj pli da kompetentoj utilaj por nia asocio. Krom la 3 partneroj jam menciitaj, ni ankaŭ partneriĝos por 2 novaj misioj kun respektive la kulturcentro de Herzberg kaj GEJ (pri la projektoj en Esperanto-stacio apud Berlino). EKC ankaŭ akceptos iun volontulon de ekster Eŭropo ekde septembro 2022, tiu restos 12 monatojn en Tuluzo. La organizo France Volontaires helpos pri administraĵoj kaj vizoj.
• En 2020, nous devions demander le renouvellement de notre agrément Service Civique pour 3 ans, et selon le plan d'actions stratégiques, pour 2 équipes de 4 volontaires. Dans le groupe de travail, nous avons décidé que nous n'aurions plus que des missions dans le cadre du service civique international, dont 7 en partie à Toulouse et en partie chez un partenaire à l'étranger. Malgré les problèmes liés à la pandémie, nous avons apprécié cette première expérience de volontariat plus longue de Quentin, Ines et Leïla. Iels sont restés 6 ou 8 mois à Toulouse (8 mois,

durée habituelle des missions jusqu'alors) et ont aussi aidé TEJO à Rotterdam, E@I en Slovaquie et BES en Pologne. Les missions seulement toulousaines ne peuvent pas durer plus de 8 mois. Cela rajoute vraiment quelque chose à la mission, et apporte un plus à EKC, même à l'étranger, ils restent en contact avec nous, apportent de l'aide aux nouveaux volontaires, envoient du matériel (articles, interviews...), des idées nouvelles et aident à renforcer les liens avec nos partenaires (comme profiter par exemple du compte zoom de BES pour cette AG en ligne). Les volontaires poursuivent leur formation à l'étranger, perfectionnent leur langue, acquièrent plus de compétences utiles ensuite à EKC. En plus des 3 partenaires déjà cités, nous serons partenaires pour 2 nouvelles missions respectivement avec le Centre Culturel d'Herzberg am Harz et GEJ (sur les projets de l'Esperanto-stacio de Berlin). En dehors de ces 7 missions, 1 volontaire non européen.ne sera accueilli.e à Toulouse pendant 1 an, dans le cadre du service civique international dit "de réciprocité". L'organisation France Volontaires aidera EKC pour l'aspect administratif et les visas.

MB deziras ke ni komentu la mesaĝon kiun Sylvie sendis hieraŭ por diri pli malpli ke ŝi ne ŝatas la fakton ke niaj volontuloj estas "senditaj" en aliaj landoj sen reciprokeco kaj ke internaciaj projektoj ne estu misio de loka asocio. Marion komentas ke eble ne ĉio klaras por ĉiuj membroj kiuj estas malpli aktivaj, aŭ povas okazi ke ekz. homoj miksas la volontulad-projekton kun Erasmus+ projekto aŭ ne komprenas kial civita servo internacia pli utilas al EKC ol simpla civita servo, kial internaciaj projektoj riĉigas lokan agadon. Tio estas grava temo, eble ni ne sufiĉe bone komunikas pri niaj diversaj projektoj, foje novaj kaj kompleksaj. Por la pandemio, ni ankaŭ havis malmultajn neformalajn diskutojn por klarigi tiujn projektojn. Pli ĝenerale, ni devos esti pli atentaj pri la komunikado al niaj membroj, kiuj ne ĉiuj legas la raportojn aŭ partoprenas la monatajn kunsidojn. Ankaŭ aliaj kanaloj gravas, kaj neformalaj diskutoj, ekz inter volontuloj kaj membroj. MB rimarkigas ke en la fina taksado de iliaj misioj, la volontuloj taksis la rilaton kun aliaj asocianoj kiel la plej plibonigindan. Do ni ĉiuj kune strebu plibonigi tion.
Kion respondi, ni decidos fine de kunsido.

• *MB revient sur le mail de Sylvie reçu la veille par le CA et quelques actifs, dans lequel elle désapprouve que EKC portent des projets internationaux car association locale, et le fait que nos volontaires travaillent pour d'autres associations à l'étranger sans contrepartie. Marion fait remarquer que cela montre que nos projets ne sont pas toujours très clairs pour nos membres, et que ceux qui ne sont pas très actifs ou proches de l'association ne comprennent pas tous les liens entre eux (ex : Service civique et Erasmus+ sont deux choses différentes même si nos volontaires ont participé à une mobilité Erasmus+, le service civique à l'international apporte plus à EKC que le simple service civique, les projets internationaux enrichissent l'action locale...). Nous devons mieux communiquer sur ces projets parfois nouveaux ou complexes. Il subsiste des confusions malgré nos efforts pour communiquer régulièrement par les réunions mensuelles, par le document avec les compte-rendus de réunion. Il est important de noter que beaucoup d'évènements et de discussions informelles n'ont pu avoir lieu à cause de la pandémie, des éléments qui participent à une meilleure communication sur tout ça car tous les membres ne lisent pas forcément les comptes-rendus ont ne participent pas aux réunions mensuelles. D'autres canaux sont importants, par exemple par les discussions informelles entre volontaires et membres.*
MB précise que dans le bilan des anciens volontaires, la partie sur les relations avec les autres membres ou associations régionales est celle qui était la moins satisfaisante à leurs yeux . D'un commun effort, nous continuerons d'améliorer cela.
Que répondre ? nous décidons d'en reparler en fin de réunion

3. Fokuso pri Projektoj Erasmus+ (MB)
   Projets Erasmus+

Ni finis projekton KA1 en septembro, verkis raporton en Oktobro, kaj ĝi ĵus ricevis oficialan agnoskon pri kvalito, la etikedon “Bona Praktiko” malgraŭ la fakto ke ĝi estis duonigita.
Ni havas alian kurantan projektojn KA2 (trejnado de trejnistoj) kaj tre grave, en Marto dum SEMEO, ni espereble akceptos renkontiĝon de tiu projekto kaj havos semajnon por ke partoprenantoj intense lernu por iĝi trejnisto, kaj poste la ĵus trejnitaj trejnistoj liverus trejnadojn en Arrout
En 2021, kaj komenciĝos ankaŭ alia projekto kun la partneroj, kies temo estos retaj trejnadoj.
Kaj ĵus estis akceptita nova projekto KA2! Temas pri volontulado kaj organiza disvolviĝo , EKC kandidatiĝis kadre de junualara programo de Erasmus+ (kun BES, Tejo, Kosmo, Herzberg, BEA), la projekto estos bona okazo diskuti la ilojn kiuj povas helpi por la volontulado formala (kadre de civita servo aŭ Eŭropa Solidareca Korpuso) aŭ neformala por ke ĝi estu pli efika por kreskigi niajn asociojn. EKC kunordigos la projekton kaj la subvencio temos pri preskaŭ 60000€

Comme prévu dans le plan d’actions stratégiques, nous avons candidaté en 2020 à plusieurs projets Erasmus+.
Nous avons fini notre projet clé 1 fin septembre, écrit le rapport final en Novembre, et malgré un projet réduit de moitié, nous finissons sur une note positive avec les félicitations de l’agence et l’attribution du label de bonne pratique.
Un projet de partenariat clé 2 sur la formation de formateurs a commencé avec 2 rencontres en ligne, et en mars il est prévu dans ce cadre une semaine intensive de formation pendant SEMEO à Toulouse. Juste après, les nouveaux formateurs pourraient diffuser leurs savoirs lors d’un stage à Arrout.
Un autre projet KA2 avec nos partenaires pour réaliser des formations en ligne, coordonnée par BES commencera en 2021.
***Un nouveau projet KA2 vient juste d’être accepté** : nous avons candidaté avec Kosmo, BES, TEJO, BEA et ICH Herzberg afin de partager nos bonnes pratiques en matière de volontariat/bénévolat pour un développement durable de nos organisations. Il pourra servir entre autres à créer des outils pour le service civique à l’international par exemple (mieux choisir les candidats, mieux les accompagner, être plus efficaces et créer plus de liens à l’international) mais permettra de réfléchir à l’engagement bénévole et au développement associatif en général. EKC coordonnera le projet et la subvention se monte à un peu moins de 60000 euros.*

21:05 *(10 min)*	**Paŭzo** *Pause*

21:15 *(30 min)*	**Aliaj projektoj** *Autres projets*

1. Federacioj de la regiono Okcitanio - bulteno (Marion)
   Fédérations de la région Occitanie - bulletin

• Dum la pasinta jarkunsido ni decidis proponi kunfandon de la bultenoj de la administra regiono Okcitanio, la federacio Midi pyrénées konsentis kaj decidis ĝi proponi kunfandi la du federaciojn. Neniu novaĵo venis poste flanke de Langvedoko-Rusiljono, kompreneble konsento de ĉiuj gravas por antaŭeniri. Leila H kaj Marion baldaŭ kontaktos diversajn asociojn kaj klubojn por vidi kiel ili fartas, kion ili faras nuntempe ktp… EKC sekvu tion ĉar ni estas membro de la federacio Midi-Pyrénées, dormanta nun atendante novaĵojn.
• *L'an passé EKC avait voté et proposé la fusion de tous les bulletins de la nouvelle région Occitanie. La fédération Midi Pyrénées a accepté et a elle, voté la fusion des deux fédérations de la région. Depuis pas de nouvelles de la part de l'autre fédération et bien évidemment le consentement de toutes est nécessaire. Leïla et Marion vont recontacter les diverses associations, savoir ce qu'il se passe en ce moment chez eux.*

2. Eldono de libro (Leïla M)
Edition d'un livre

• Pro la fakto, ke Leïla M studis eldonadon lastan jaron, ili pripensis, originale kun Marion kaj Françoise, eldoni unu libron nome de la asocio. Ne krei libron sed adapti jam ekzistantan libron, de la franca el Esperanto, do ni pagus la rajtojn al eldonisto, poste farus la tradukadon kaj la novan paĝaranĝon. Leïla kunordigas tion sed gravas ke ĉiuj konsentas pri la elekto de la libro – kiu ankoraŭ ne estas elektita – kaj kun la celoj. La ideoj de ĉiuj estas bonvenaj, Leïla kreis Google doc por resumi la projekton kaj kolekti viajn ideojn. La asocio havos belan kultur-objekton por montri en atelieroj, standoj, ktp:
https://docs.google.com/document/d/1LmY8IF1aSfJnFGFIX_ME9RI7444cFnya_o8kOlUjB8A/edit#heading=h.9qd1sp1mmxo4

Comme Leïla M a étudié l'édition et a certaines compétences dans le domaine, avec Marion et Françoise, elles ont eu l'idée d'éditer un livre dans le cadre de l'association. Ne pas créer complètement un livre mais adapter un livre existant, du français à l'espéranto. Nous paierions les droits à un éditeur, ferions la traduction et une nouvelle mise en page. Leïla coordonne le projet, mais c'est important qu'il y ait consensus sur le choix du livre, qui n'est pas encore choisi, et sur les objectifs de ce choix. Toutes les idées sont encore bienvenues, Leïla a créé un document pour résumer le projet et collecter vos idées. L'association aura un bel objet culturel à montrer dans les ateliers, sur les stands...

3. Pasintaj eventoj de Oktobro (Leïla H)
Événements passés depuis Octobre

• Ni organizis multajn eventojn de Oktobro : bicikladon, malkovrateliero en la Topina, manĝoklaĉojn, fizike kaj rete, du retajn ludvesperojn, monatan retan kunsidon, kaj fine ni partoprenis en Esperanto-sumoo legadodefio. Ni kapablis plu agadi rete pro kaj malgraŭ la sana situacio.

• Nous avons réalisé beaucoup d'événements ces deux derniers mois: une balade en vélo, un atelier à la Topina, des repas-tchatches, en vrai au Hangar de la Cépière puis en ligne, deux soirées jeux, une réunion mensuelle en ligne, et enfin nous avons participé au défi lecture Esperanto-SUMOO. Nous avons su rester actifs même en ligne, à cause de et malgré la situation sanitaire.

4. SEMEO 2021 (Marion)
   Semaine de l'espéranto mars 2021

   • La organizado de SEMEO 2021 ankoraŭ ne komencis, sed en la programo ni planas reorganizi la eventojn ke ni ne povis fari en 2020. Ne tre probablas nova turneo kun Kjara. Ĉu ni povos organizi ion en universitatoj en 2021? Ni devos vidi pro la koronviruso. Ni ne faros ion tro kostan, tro ambician, ni restu flekseblaj. Ni havis ideon ankaŭ fari parteton rete, ekz. unu vesperon, por reklami pri SEMEO, ekz. en eventaservo. Ankoraŭ ne tutcertas ĉu la renkontiĝo Erasmus+ povos okazi sammomente. Ni faros kunsidon pri SEMEO en Januaro.
   • L'organisation de 2021 n'a pas encore commencé et nous aimerions faire les événements qui n'ont pas pu avoir lieu en 2020. Peu plausible de réorganiser la tournée de Kjara, nous referons avec plaisir des événements dans les universités, mais sera-ce possible? Nous ne voulons pas être trop ambitieux, ne pas inviter trop de monde et le faire dans des lieux facilement modifiables. Nous pourrions prévoir une petite partie en ligne, au moins une soirée pour promouvoir l'événement à l'extérieur, et se servir d'eventaservo.org. A voir aussi si la rencontre Erasmus+ pourra avoir lieu à cette occasion. Une réunion sur le sujet de SEMEO aura lieu en janvier.

5. Kvartaldomo Rangueil - Kultura programo (Leïla M)
   Maison de Quartier de Rangueil - Programme Culturel

   Antaŭ la 2a trudizoliĝo, ni volis valorigi nian libroservon/bibliotekon en la kvartaldomo de Rangueil, denove uzebla post unu jaro da laboroj. La ĉambron tie ni havas ĉiumarde de 17h ĝis 19h. Do ni preparis kultur-programon, kun diversaj rendevuoj etenditaj sur pluraj semajnoj : atelieroj pri origamio, pri kolaĵo, legadklubo, kristnask-aperitivo… eĉ la Esperanto-Sumoo kiun ni fine faris rete. Ni preparis varbkampanjon kun afiŝoj por meti en Rangueil kaj en la proksimaj universitatoj por allogi publikon. Estus rendevuoj por konfirmitaj esparantistoj, do por niaj membroj, sed ankaŭ por lernantoj kaj scivolemoj! Estus alia maniero interesi la homojn, kun praktikaj aktivadoj kaj temaj babiladoj. Fine, estus regulaj eventoj kiuj povus longtempe engaĝigi la homojn pri Esperanto. Ni ne povis starigi ĝin pro la kronviruso sed ni konservu tion por pli favoraj tagoj.

   Avant le 2ème confinement, nous voulions mettre en valeur nos livres (Librairie et bibltiothèque) à la Maison de Quartier de Rangueil, de nouveau à notre disposition après plus d'un an de travaux. La salle demi-lune est réservée chaque mardi de 17h à 19h. Nous avons donc préparé un programme culturel avec des rendez-vous sur plusieurs semaines : ateliers origami ou collage, club lecture, Esperanto-sumoo (défi lecture que finalement nous avons mené en ligne), goûter de Noël. Nous avions préparé une campagne de communication pour le Quartier et le campus de Rangueil. Ce seraient des moments conviviaux pour les espérantophones, nos membres, mais aussi pour les élèves ou les curieux ! Une autre manière

d'intéresser les gens avec des activités pratiques ou des discussions thématiques, des rendez-vous réguliers qui pourraient engager à long terme les participants autour de l'espéranto. Nous n'avons pas pu mettre en place tout ça à cause du virus mais nous gardons le programme pour des temps plus favorables.

6. Libroservo (Jonathan)
   Service de Librairie

   • EKC proponas libroservon, ĝi disponeblas rete en nia retejo, estas libroj pri esperanto movado, lernolibroj, romanoj kaj novaĵoj ekzemple, buŝmaskoj, PMEG-on ktp… . La volontuloj ĝisdatigas la stokon, kaj kreas paĝojn en nia retejo por valorigi kaj videbligi ĝin.
   • EKC propose une librairie en ligne sur notre site (où l'on peut trouver tout types de livres et des nouveautés comme par exemple la nouvelle POMEGO et des masques par exemple). Les volontaires gèrent le stock et les pages du site pour le valoriser et le rendre visible.

7. Radioelsendo (Tanneguy)
   Emission de Radio

   • La radio-elsendo okazas nuntempe dufoje monate (antaŭe ĉiusemajne sed ne vivaj elsendoj bezonas pli da laboro, muntado). En ĝi estas multaj intervjuoj (Ekz. kun Bertilo Wennergren, kun tuluza artisto *Titos Kontou*…) aperis novaj rubrikoj pri kuirarto aŭ legado de infanlibroj. Ni ankaŭ faris elsendon pri la lingvoj de Francio. Se vi ne disponeblas lundon, vi povos aŭskulti la elsendon kaj legi ĝian programon kaj trovi interesajn ligilojn en nia retejo en kiu estas la podkasto kaj la programo de la elsendo.
   • Depuis décembre, l'émission a lieu deux fois par mois (auparavant une fois par semaine, les émissions ne sont plus en direct et donc plus longues à produire, à monter). Nous avons réalisé plusieurs interviews (Bertilo Wennergren, l'artiste Titos Kontou...). De nouvelles rubriques, comme les recettes de cuisine et la lecture d'histoires jeunesse, sont apparues. Si vous ne pouvez pas nous écouter le lundi soir, vous pouvez nous réécouter sur notre podcast et retrouver le programme des émissions et les liens intéressants sur notre site.

8. Retejo (Leïla M)
   Site internet

   En ĝi kuŝas la radio-elsendo, la libroservo, ankaŭ en ĝi ni afiŝas niajn eventojn kaj artikolojn. La volontuloj programas kalendaron por la publikado de la artikoloj kaj zorgas pri ĝisdatigo de la paĝoj. Ni invitas vin ĉiujn verki artikolojn por riĉigi la blogon !
   Sur le site, vous pouvez retrouver les podcasts de l'émission de radio, la librairie en ligne, nos événements et nos articles. Le volontaires organisent le calendrier de publication et s'occupe de mettre à jour les pages. Nous vous invitons tous et toutes à écrire des articles pour enrichir notre blog !

9. Sociaj retoj (Jonathan)
   Réseaux sociaux

   • Leila H kaj Jonathan faris videon "Esperanto kaj vi" kun la

kontribuon de la membroj de la asocio. La video estos spektita en la fino de la kunsido.
La asocio agadas ankaŭ en multaj aliaj retoj: Twitter, Reddit (nova, kreita per Jonathan), Instagram, Facebook, Discord, eventaservo
Propono de Flo interesiĝi pri la nova esperantista socireto "Miavivo.net"

• *Jonathan et Leïla H ont réalisé une vidéo "Esperanto kaj vi?" avec des contributions des membres (bientôt sur la chaine YouTube de l'association). Visionnage en avant-première à la fin de la réunion ! L'association est active aussi sur de nombreux réseaux sociaux : Twitter, Reddit (nouveau compte créé par Jonathan), Instagram, Facebook, Discord, eventaservo*
Proposition de Flo: Mia Vivo, nouveau réseau social espérantiste où il serait intéressant de créer un groupe. https://www.miavivo.net

21:45 *(10 mins)*	**Elekto de novaj komitatanoj** *Election des nouveaux membres du conseil d'Administration*

La mandatoj de Marion, Michael Boris, Christophe kaj Niko daŭras unu plian jaron. Tiuj de Françoise kaj Marko finiĝas. Pliaj kandidatoj bonvenas.
Por informe, Marion rekandidatiĝas por plu esti kasisto sed Christophe ne plu volas esti prezidanto.
Les mandats de Marion, MB, Christophe et Nico durent encore un an de plus, Ceux de Françoise et Marc arrivent à leur terme. De nouveaux candidats sont les bienvenus.
Pour info, Marion recandidate pour être trésorière mais Christophe ne veut plus être président.
• Marko ne plu volis esti komitatano. Komitatanoj devas esti minimume 4, volontuloj rajtas komitataniĝi. Kandidatas por la komitato : Jonathan, Leila H. Françoise rekandatiĝas. Simon.e estis proponita de MB sed ri devos konsenti.

• *Marc ne veut plus être membre de conseil d'administration. Ses membres doivent être 4 minimum. Les volontaires ont aussi le droit de se présenter.*
Jonathan et Leila H se présentent. Françoise se représente. Simon.e est proposé.e par MB, à condition qu'iel accepte.

Unuanime elektitaj
Iels sont élus unanimement !
Novaj membroj de la komitato : Marion, Christophe, MB, Nicolas, Françoise, Leila H, Jonathan, kaj Simon.e, (kiu konsentos kelkajn tagojn poste)
Nouveaux membres du conseil d'administration: Marion, Christophe, MB, Françoise, Nicolas, Leila H, Jonathan, kaj Simon.e, (qui a donné son accord quelques jours après l'AG)
La elekto de prezidanto kaj kasisto okazos pli poste en Januaro kadre de komitatkunsido.
Le vote des président.e et trésorièr.e aura lieu plus tard au sein du CA.

21:55 *(10 min)*	**<u>Aliaj diversaj aferoj/demandoj</u>** *Questions diverses*

1. Ĉu respondi al Sylvie nome de la asocio aŭ persone?
   Marion respondos propranome al ŝia mesaĝo kopie al la aliaj ricevintoj (komitatanoj kaj aktivuloj) . Aliaj povos kompletigi aŭ komenti.
   Répondre à Sylvie au nom de l'asso ou individuellement ?
   Marion propose de répondre en son nom propre à son message, en mettant copie les autres destinataires (les membres du CA et autres actifs). D'autres pourront compléter ou commenter.
2. Komuna spektado de la video de EKC "Esperanto kaj vi?"
   Visionnage de la vidéo de EKC "Esperanto kaj vi?"